

# KOMENCANTO

*gazeto por komencantaj aŭtoroj kaj komencantaj esperantistoj*



Ĉu atingebla?

**Martin Glnette**  
[SAULXURES/MOSELOTTE, Francio]

2001

kiel Ĵak Le Puil, redaktoro de "La KancerKliniko" iĝis  
esperantisto — literatur-historiaj paĝoj — bona humoro —  
konvenas rimo por saĝa esprimo — aforismoj — anekdotoj —  
anoncetoj — informoj — korespondu!

5

## Perantoj de KOMENCANTO

ĉe tiuj adresoj vi povas aboni nian gazeton

**Argentino** Argentina Esperanto-Ligo, Casilla de Correo 2910 - Correo Central, AR-1000 Buenos Aires.

**Aŭstralo** Libroservo de AEA, Esperanto-domo, 143 Lawson St., Redfern N.S.W. 2016

**Belgio** Flandra Esperanto Ligo Frankrijklei 140, BE-2000, Antwerpen

**Brazilo** Brazila Esperanto-Ligo, Caixa Postal 03625, Brasilia (DF) - BR - 70084-970

**Britio** Esperanto-Asocio de Britio, Wedgwood Memorial College, Barlaston, Stoke-on-Trent, ST12 9DG.

**Ĉeĥio** Vladislav Hasala, A.Dvoráka 1, CZ-696 62 Strážnice

**Danio** Revuservo de Dana Esperanto-Asocio Frederik Eriksen, Finsensgade 10, DK-4800, Nykobing F.

**Estonio** Virve Ernits, Mahla 65 — 1, EE — 0012, Tallinn

**Finnlando** Heta Kesälä, Kalamiehenkuja 3 D 32, FI-04300, Tuusula

**Francio** ~ Unuiĝo Franca por Esperanto, 4 bis, rue de la Cerisaie, 75004, Paris.

~ R.Melo, 34, Av. de Russie, FR-03700, Bellerive S/A

**Germanio** Dr. Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Strasse, 9 D-55129 Mainz.

**Irano** Irana Esperanto-Centro, P.O.Kesto 17765-184, TEHRAN

**Italio** Itala Esperanto Federacio, Via Villorosi, 38, 20143, Milano.

**Italio, Kroatio, Slovenio**  
Višnja Brankovič, Via Leghissa 6, IT-34131 Trieste

**Katalunio** Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat 290, ES-08200, Sabadell

**Kubo** Lazaro Azcuy Ravelo, str. 25 #5611 c/56460 Playa 11300, HAVANO

**Litovio** Litova Esperanto-Asocio, LT-3000, Kaunas, ab.k. 167.

**Norvegio** Norvega Esperantista Ligo, Olaf Schous vei 18, N-0572 OSLO

**Pollando** Maciej Wnuk, Skrytka 105, ul. Broniewskiego 77-137, PL-01-865 Warszawa

**Svedio** SEF, Lisbet Andréasson, Södra Rörum pl 455, SE — 24294 Hörby

**Svislando** Christoph Scheidegger, Im Schleedorn 6, CH — 4224 Nenzlingen

### Usono

Esperanto Ligo por Norda Ameriko, P.O.Box 1129, El Cerrito, California 94530, U.S.A.

## redakcie

### Karaj legantoj!

Antaŭ vi estas la 5-a kajero de "K". Sur ĝia kovrilo debutas kiel desegnisto s-ino *Martin Ginette* el Francio, kies amuzaj rakontoj estas konataj por vi.

La gasto de la najbara paĝo - *Jak Le Pail*, neordinara kaj tre interesă persono en Esperantujo.

Germanaj aŭtoroj de la dua periodo de E-literaturo ĉe la literatur-historia temo. En la mezo - bonhumoraj noveletoj kaj humuraj desegnaĵoj.

Temo de proverboj okupas ĉi-foje eĉ du paĝojn. Aforismoj, Anekdotoj, Anoncetoj kaj korespondadreso, konkurso kaj horaro de Ĉina Radio Internacia en Esperanto fine de l' gazeto.

Ni ĝojas pri la apero de novaj nomoj en ĉi tiu numero, inter ili *M.Ginette*, Francio, *A.Szrajbman*, Britio, *A.Kornjuĥina* kaj *A.Marijĉeva*, Ruslando kiel pentristoj; *N.Popov*, *V.Puŝkarjov*, *K.Nosova*, *I.Belousov*, *A.Kornjuĥina*, *L.Gonĉarova*, *A.Loŝmanov* el Ruslando kiel aŭtoroj.

Ni nove kaj denove insiste invitas ĉiujn legantojn verki kaj pentri por via kaj nia plezuro!

Agrablan legadon!

Viaj DONACOJ por KOMENCANTO  
estas ĉiam bonvenaj!

## KOMENCANTO

2001 numero 5 // 8 numeroj jare  
regule aperas ekde 1997

redaktas kaj eldonas: Viktor Kudrjavcev  
konstanta kunlaboranto: Rafija Jafasova  
adreso:

620041, Ekaterinburg, ab. ja. 132, Ruslando  
retpoŝto : let@epost.uralpost.ru  
abontarifo por 2001:

internacia tarifo: 13 eŭroj aŭ \$14;  
orienteŭropa kaj latinamerika tarifo : \$11,  
aŭ por ĉiuj — 16 IRK

konto ĉe UEA: vkud-a

ruslanda tarifo: 100 rublej (za 8 nomerov v god) prostym noĉtovym perevodom na imja Kudrjavceva Viktora Vasильeviča:  
620041, Ekaterinburg, a. я. 132

Oni rajtas uzi bildojn kaj verkojn el "K".

La sola kondiĉo - nepre menci KOMENCANTO'n, la nomojn de la aŭtoroj kaj ties loglokojn.

Kiel tio komenciĝis

Ĵak Le Puil

redaktoro de "La KancerKliniko"

— politika, kultura, skandalema, ajnista gazeto

... belas la viv', des pli kiam sunas! Antaŭen!

*Karaj amikoj! Gasto de nia paĝo estas konata franca esperantisto, poeto, tradukisto, kanzonisto redaktoro kaj eldonisto de neordinara gazeto "La KancerKliniko" — Ĵak Le Puil.*



*Mi memoras la varnegan someron 1987. Esperanto - 100-jara!*

*Jubileaj kongresoj de UEA kaj TEJO en Pollando. Belega urbo Krakovo. Ni konatiĝas kun impona kaj afabla franca paro Armela kaj Ĵak Le Puil. Li tuj enmanigas al mi kalendarojn de "La KancerKliniko".*

*Neforgesebla nokto en la ĉambro de studenta domo, kie loĝis nia junulara teamo el Sovetunio. Poloj, germanoj, rusoj, francoj dense ĉe la tablo. Kaj ĝis mateno — kanzonoj kaj gitarludo de Ĵak kaj Armela Le Puil. Denove mi renkontis la ĉarman paron dum la 83-a Kongreso de UEA en Montpellier, Francio, 1998. Post jardeko ili preskaŭ ne ŝanĝiĝis, la sama ĉarmo kaj la sama brilo de okuloj...* (V.K.)

**M**i eksciis pri Esperanto dank'al anonco en liberecana gazeto, kiu informis ke kurso de la internacia lingvo komenciĝos en la anarkiista sidejo en septembro 1958 (mi tiam estis 18-jara). Mi tuj enskribiĝis al tiu kurso en

Parizo, kun mia frato kaj du gekamaradoj.

Nia instruisto, Puechagut, poŝtisto, estis afabla homo, membro de SAT. Mi — jam ribelulo! — neniam kontestis ion ajn rilate la lingvon kaj sufiĉe diligente faris ĉiujn taskojn, plej ofte en la metroo kaj aŭtobuso, ĉar ja loĝis mi tiam en ĉirkaŭurbo kaj la vojaĝo por rehejmeniri daŭris pli malpli unu horon kaj duono.

Mi rapide konatiĝis kun ĉefa esperantisto A. Vezely, kiu parolis nur en Esperanto, kaj kun du italoj, Revel, kiu rapide mortos kaj Dino Fontana, kiu iĝis tre bona amiko dum multaj jaroj.

Post kelkaj monatoj mi tute nature aliĝis al SAT.

Kaj — kiel multaj — mi distanciĝis de Esperanto ĝis la jaro 1965, kiam mi decidis instrui Esperanton en Alĝerio, kie mi estis instruisto. Ĉiuj miaj lernantoj estis alĝerianoj, krom mia kunulino, Armela. Mi tiam aliĝis ankaŭ al UEA.

Fakte mi restis izolulo ĝis la jaro 1968, kiam mi kontaktiĝis kun esperantistoj de la Berry-regiono (meze de Francio), kie mi tiam ekloĝis.

Mi reparizaniĝis en 1971. Aktivis en SAT-Amikaro kies komitatano mi estis dum pluraj jaroj ĝis 1977. Mi komencas kanti en Esperanto dank'al tradukoj de Georges Lagrange. Fine de 1976 mi kreas, kun Jopetro Danvy kaj Laŭrenco Septier la gazeton *La KancerKliniko*.


Unuan Kongreson de TEJO en Poitiers (Francio) en 1977. Registro de mia unua kasedo *Danĝera ul'* la saman

jaron en Romo. Kunkreado de la pariza kabaredo *La Ruĝa Kruĉo*. Unuan UK-on en 1978 en Varna (Bulgario).

Kelkajn jarojn poste, kunredaktado kun Danvy kaj aliaj de vortaro *franca-esperanta*. Dum pliraj jaroj komitatano de Unuiĝo Franca por Esperanto. Tradukoj kun Armela de Florville kaj Courval de l' Markizo de Sade, *La Maljunulino kiu paŝis en la maro de San-Antonio*, *Higieno de l'murdisto* de Amelie Nothomb kaj por UEA *Paĉjo, kio estas rasismo?* de Tahar Ben Jelloun. Intertempe mi registris tri aliajn kasedojn. Mi do esperas ian registri la kvinan... kaj, kun Armela, ni daŭrigas niajn tradukojn, en nia fora kamparo kien ni revenis en 1989.

Grava atentigo: post unu jaro LKK estos 25-jara... kio ja tute ne reunigas nin! Krom tio, belas la viv', des pli kiam sunas! Antaŭen!

*Ĵak Le Puil*



Jurij Perevalov

[LESNOJ, Ruslando]

# La 2-a periodo de esperanta literaturo

## *Germanaj verkistoj*

Karaj legantoj!

En la antaŭaj numeroj de "K" ni prezentis al vi eminentajn hungarajn verkistojn kaj tiel nomatan Budapeŝtan skolon, kiun ili fondis kaj kiu sendube grave influis nian literaturon.

Ĉi-foje ni prezentas kelkajn germanajn aŭtorojn, kiuj restigis signifan spuron en literaturo de la dua periodo, kaj komencas nian rakonton de la germana presisto, ĵurnalisto kaj eldonisto **Teo Jung** (komplete: Theodor Karl Aŭgust Heinrich Jung). Li naskiĝis 21 dec 1892 en Meckenhelm. En la 15-a vivjaro pro malriĉeco li devis rezigni la pluan gimnazian studadon. Teo Jung esperantiĝis en 1909, poste gvidis kursojn.

En 1919 kun aliaj li restarigis la Rejnlandan-Vestfalian E-Ligon, fariĝis ĝia estrarano kaj eldonis monatan revueton "Progreso".

En 1920 sekvis fondo de semajna ilustrita ĵurnalo "Esperanto Triumfonta", kiu en 1925 ŝanĝis sian titolon je "Heroldo de Esperanto". La kuraĝa iniciato — fondo kaj regula aperigo de semajna gazeto signas memorindan fakton en la historio de Esperanto kaj havas specialan gravecon por la post-militaj jaroj.

Per tiu gazeto T. Jung sukcese helpis revigligi la E-movadon en Germanujo kaj ankaŭ internacie. Li batalis por konkorda laboro inter ĉiuj faktoroj de la E-movado kaj por ilia unuecigo en

plilarĝigita UEA (Universala E-Asocio). Granda merito de la gazeto estas ankaŭ la ellaboro de la glata, rutina gazetlingvo.

En 1910 T. Jung publikigis sub pseŭdonimo sian unuan originalan rakonton en germana E-gazeto, post kiu sekvis vico de la aliaj, jam sub vera nomo. Dum kelkaj jaroj li laboris je projekto de "ideala lingvo" tutmonda, kies ideo revenas ankaŭ en lia romano.

T. Jung skribis multnombrajn artikolojn, poemojn, skizojn, rakontojn en multaj E-gazetoj. Lia verkaro entenas: poemon "La alta kanto de la amo" (1926), rekantintan laŭ malnova legendo kaj premiitan ĉe la 12-aj Internaciaj Floraj Ludoj, fantazian aventuracan romanon "Lando de l' fantazio" (1927), plurajn postrakontojn (de "Mil kaj Unu Noktoj", de "Sakuntala" de Gudrus). Li ankaŭ estis kuntradukinto de Remarque "En okcidento nenio nova" (1929) kaj kunaŭtoro de la lernolibroj. Artikoloj kaj verkoj de Teo Jung ankoraŭ nun estas fonto de utilaj pensoj, spertoj kaj observoj.

Ni volas mencii ankaŭ du germanajn E-lingvistojn de tiu periodo. La unua el ili estas **Eugeno Wuster**, fondinto de esperantologio. Li naskiĝis 10 okt 1898 en Wieselburg, en Aŭstrio; estis doktoro-inĝeniero. Tradukis el la rusa lingvo "La germana inteligentularo" de Kabanov (1917), "Pliorio" el germana (kun aliaj, 1917), "La kantistino" el la germana (1921), "Petro Schlemil" de

Chamisso (1922); verkis multnombrajn traktaĵojn pri la E-movado aŭ lingvo, inter kiu "La lastaj tagoj de l' Majstro" (kun aliaj, 1921). Valora estas lia grandioza "Enciklopedia vortaro", aperinta, bedaŭrinde, nur ĝis la litero "K", kiu estis la plej funda kaj detala registro de la Zamenhofa lingvo-uzo. Tre grava estas ankaŭ lia laborado pri la teknikaj vortaroj.

Dua germana lingvisto estas **Walter Zippmann**, doktoro jura, advokato kaj prokuroro. Li naskiĝis 13 okt. 1895 en Leipzig. Esperantisto ekde 1908, de kiam li fervore okupiĝis pri multspeca propaganda laboro, instruis, gvidis la gramatikan sekcion de E-Akademio. W. Zippmann estis ŝagaca pritraktanto de Zamenhofaj "Lingvaj Respondoj" germane. Sub lia nomo aperis multaj artikoloj, gramatikaj kaj literaturaj en E-gazetoj.

Esperantologiaj artikoloj de tiuj du germanaj lingvistoj grave kontribuis al la scienca fikso de la esperanta vortsistemo.

Ni volas prezenti al vi, karaj legantoj, ankoraŭ unu germanan verkiston, kvankam angliĝintan. Lia nomo estas **Heinrich Zuyken**.

Li naskiĝis 10 dec. 1864 en Allenkirchen, en Germanio. Edukiĝis en Dusseldorfaj gimnazio. En 1885 li venis en Anglujon, edziĝis al anglino. Esperantiĝis en 1904, ekde tiu momento entuziasme propagandis la lingvon. H. Luyken verkis ampleksajn originalajn romanojn: "Paŭlo Deben-

ham" (1912), "Mirinda amo" (1913), "Stranga Heredaĵo" (1922), kaj "Pro Iŝtar" (1924).

Inter la ĉeffiguroj de la romanoj ĉiam troviĝis unu, kies kristanan kredon subfosis iaj herezaj delogoj aŭ personaj malfeliĉoj. Tio alportis al la heroo la animan turmentiĝon kaj materialajn danĝerojn, de kiuj lin savis aliaj herooj, kies simpla kredo restis, malgraŭ ĉio, neŝancebla. Cetere la kredkonflikto en la animo de la herezema heroo estas tiel lerte pentrita, ke la leganto kunsente sekvas ĝin.

Tiel maniere la aŭtoro deziras servi Esperanton al la disvastigo de liaj religiaj idealoj. Postmilite en romano "Stranga Heredaĵo" Luyken eĉ pli forte esprimis sian evangelismon, ĉar opiniis, ke renaskiĝinta Kristanismo devas doni moralan forton al la nebuleca Esperantismo.

Kvankam la romanoj de H. Luyken aspektas iom arkaikaj kun siaj ĉefherooj, kiuj iom skeme prezentas la bonon aŭ malbonon, oni devas konfesi, ke la aŭtoro sciis verki bonstilajn romanojn, kiuj ĝisfine tenas la intereson dank'al la intrigaj aventuroj kaj amhistorioj.

"Pro Iŝtar", la plej sukcesa el la kvar, havas kiel historian fonon la antikvan Babilonon, kaj en kiu batalas inter si la vera kredo je Jehovo kaj la babilona idolanismo. En la romano Luyken povas krei la interesokaptan streĉon ĉirkaŭ la persono de la belega sed malica Zalmuna.

Sube por via atento estas prezentata fragmento de la romano "Pro Iŝtar", legante kiun vi mem povas taksii la verkostilon de H. Luyken.

## Heinrich Luyken PRO IŜTAR

Venuso jam estis brila stelo en mallumiĝanta okcidenta ĉielo, kaj ripozema naturo sin envolvis en silento, kiam rajdanto sur kamelo alproksimiĝis al flanka pordego de la bieno de Zalmuna. Rajdanto kaj besto estis polvokovritaj, kaj per tio supozigis, ke ili venis de tre malproksime. Kvankam la viro aspektis maljuna, li deglitis de la kamelo kun rimarkinda facilmoveco. Portante sakon sur la ŝultro, kaj kondukante la kamelon per bridorimeno, li aliris parton de la domo, okupitan de la servistaro.

— Hola! — kriegis la viro.

Tuj kiam li aŭdis alproksimiĝantan piedsonon, li alprenis aspekton de malfortika maljunulo, laca pro longa vojaĝo. Neĵuna virino malfermis kadron, kaj rigardis la alveninton kun preskaŭ malkaŝa malplezuro. Ignorante la malbonhumoron de la virino, Lemuel - ĉar tio estis li, lerte alivestita — salutis ŝin kun humileco, miksitaj kun ŝajnesenartifika digno:

— Paco estu kun ĉi tiu palaco, virino. Mi venis, por demandi pri la farto de mia sinjorino Zalmuna, la Belulino. Mi estas Jaŝab, Joktanido, kaj komercisto el Uzal. Sciigu, mi petas, al via sinjorino, ke mi atendas ŝian bonvolon laŭ ŝia ordono.

— La sinjorino Zalmuna ne estas hejme, la virino respondis heziteme.

— Ne hejme! - ripetis Lemuel kun bone ŝajnigita konsterno, - ne hejme?

— Ne, - rediris la servistino per voĉtono, kiu jam montris iom da scivolo kaj molkoreco. — Zalmuna iris Babelon antaŭ kelke da tagoj, kaj mi ne atendas ŝian revenon antaŭ la fino de ĉi-tiu monato.

— Tre ĉagrena afero, virino, - diris la Joktanido malrapide, kaj skuante la kapon kun aspekto de laciĉo kaj profunda malĝojo. — La sinjorino Zalmuna tion ankaŭ tre bedaŭros. Ĉu mi povas paroli en la orelon de via dommastrino . . . Halka, ĉu ne? . . . Ajla bone, de Ajla?

Li diris tion tre simple, kvazaŭ jesa respondo nepre venos, bone sciante tamen, ke Ajla en tiu sama momento estas en la domo de Omar, sekrete babilante kun Nupta — tre kredeble pri la vizito de la fremdlandaj gastoj, inkluzive de li mem. La servistino respondis iom surprizite: — Ne, Ajla ne estas en la domo en la nuna momento. Tre eble ŝi revenos malfrue. Revenu morgaŭ matene.



**Yonier Cables Solis** [HOLGUIN, Kubo]

## Rido senbrida estas ĉiam valida

Ĉu vi sufiĉe pensas pri tiu ĉi faceto de via sano?

☺ Rido liberigas. Humuro malstreĉigas.

☺ Rido povas liberigi vin de falsa seriozeco.


☺ Rido estas la plej bona kosmetikaĵo por via ekstero kaj la plej trafa medikamento por via interno.

☺ Rido kaj humuro ne nur influas vian metabolon, sed ankaŭ vian ĉirkaŭaĵon. Ili malpliigas tension kaj larmojn.

☺ Rido kaj humuro liberigas vin de mortiga seriozeco pro pezegaj problemoj, liberigas vin de ĉiutagaj rutinaĵoj.

☺ Rido kaj humuro estas la plej bonaj rimedoj kontraŭ venenigo de spirito kaj koro.

☺ Rido kaj humuro kreas novajn spacojn por ĝis nun nekonata vivĝojo.



**Jurij Perevalov** [LESNOJ, Ruslando]

☺ Estas perdita tiu tago, kiam vi ne estis ridinta!

**Aleksandr Ŝulepov** [VERĤOTURJE, Ruslando]



**Valenteno Puŝkarjov**  
[EKATERINBURG, Ruslando]

## Surprizo por ebriulo

Li revenis per ĉevalo kun ĉaro, ligis ĝin al la barilo ĉe legomĝardeno, apud domo kaj falis en la korto, ekdorminte.

Kelkaj konataj viroj decidis ekŝerci: ili maljungis la ĉevalon, traŝovis timonojn en barilon kaj denove jam tiel, trans la barilo, jungis la ĉevalon. Leviginte, la ĉevalisto eksidiĝis en la ĉaron kaj prenis tirrimenon. Kiam li ekvidis baron, li ekkriis: "Diable! Kiel vi tien trafis?!"

**Ludmila Leksina**  
 [(SUDĴA) Ruslando]

## Kurtaj rakontoj el hejmaj fontoj

### Duopo sub fenestro

Mi vekigis pro la bruo. Estis la bela somera nokto. Kantis najtingaloj. Pro ĥoro de najtingaloj mi ne komprenis vortojn, sed lia voĉo estis tre karesa.

“Ĝeamantoj! - pensis mi. — Kiel karese parolas junulo. Sed junulino silentas. Modestulino!”


Kaj mi imagis sveltan junan belulinon kun bluaj okuloj kaj blondaj haroj. Povas esti, ĉi tio estas ŝia unua rendezuo.

Subite mi ekaŭdis, ke iu ekkuris. Tuj la viro laŭte kaj abrupte diris: “Iru al mi!”

Kio okazis?

“Iru al mi, Volfo!” - denove laŭte diris la viro.

Volfo! La hundo!? Ho! Mi tute forgesis strangan kutimon de mia najbaro ebriete promeni kun sia hundo nokte!



**Anastasija Marijĉeva** [OBLUĈJE, Ruslando]

### Eĉ musoj scias...

Aperis foje en mia kelo musoj. Kaj mi fermis tie la katinon. Post unu ĥoro mi venis al la kelo. Silento... Malfermite la pordon mi ekvidis, ke la katino trankvile dormis sur breto. Mi estis ne kontenta. Sed la musoj, evidente, sciis, kio estis la katino kaj malaperis!

Denove ili aperis en la kelo, kiam mi jam havis ne malgrandan laboreman katinon, sed grandegan katon.


Mi ankaŭ fermis en la kelo la katon. Ĝi tuj komencis kriegi. Mi estis tre kontenta: pro tia krio ĉiuj musoj devus forkuri.

Ili ne forkuris. Eĉ al mi ŝajnis, ke alkuris en la kelon la musoj de najbaroj.

“Mallaboremuloj! — diris mi al la kato kaj la edzo. La unua ne kaptas musojn mem, la dua ne povas ripari muskaptilon.

Ĉiuj viroj kaj katviroj estas mallaboremuloj, eĉ musoj scias tion!”

ambaŭ katoj de **Snejana Kononova**  
 [Nijijaa OMKA, Ruslando]





**Bill Thorne**  
**RIMARO**

**AKO**  
abako  
almanako  
anorako  
atako  
barako  
bivako  
brako  
ĉabrako  
ĉako  
drako  
fako  
flako  
frako  
hamako  
jako  
ĵako  
kajako  
kloako  
konjako  
kozako  
sako  
ŝako  
tabako  
zodiako

**ANDO**  
bando  
dando  
demando  
frando  
grando  
kando  
komando  
lando  
strando

Ĉi-sube troviĝas kelkaj respondoj al la taskoj fin-verki la proverbojn ("K"-2,3). Inter ili estas vere interesaj trovadoj. En Esperanto proverboj estas tre belaj kaj trafaj, oni povas tute facile verki la proprajn proverbojn, estas tre bona lingva trejnadob por komencantoj kaj aliaj bonaj homoj.

La proverbojn *finverkis*  
*Nikolao Popov*  
[Miĉurinsk, Ruslando],  
*Valentin Puŝkarjov*  
[Ekaterinburg, Ruslando],  
*Margarita Zujeva*,  
[Moskvo, Ruslando].

## KONVENAS RIMO POR

**Ne doloras frapo...**

... sur kaŝita kapo *Popov*  
... se ĝi trafas ĉapon *Puŝkarjov*

**Ne ŝovu nazon...**

... en elektran fazon *Popov*  
... en danĝeran okazon *Puŝkarjov*  
... en mian monujon  
kaj inkujon *Zujeva*

**Tempo estas valoro...**

..., sed oni preferas oron *Popov*  
... por sukcesa laboro *Puŝkarjov*  
... aŭ perdita trezoro *Puŝkarjov*

**La dormo estas bona...**

..., se dormi kune *Popov*  
... sub verda ombra krono *Puŝkarjov*

**Kiu frue leviĝas...**

... - unua botiĝas *Popov*  
..., tiu ĉie troviĝas *Puŝkarjov*  
..., tiu rapide vestiĝas *Puŝkarjov*  
... - pli sukcese rezultiĝas *Zujeva*

**Inter generaloj ...**

... - spertaj liberaloj *Popov*  
... okazadas skandaloj *Puŝkarjov*  
... estis herooj de bataloj *Puŝkarjov*  
... estas multe da stultuloj *Zujeva*





Jen venis unuaj provoj de frazoj kaj esprimoj, verkitaj helpe de la RIMARO de Bill Thorne. Kuraĝis uzi ĝin Margarita Zujeva el Moskvo, Ruslando.


Ni esperas ke ŝia ekzemplo kaj viaj propraj kapabloj kuraĝigos vin, karaj legantoj, verki proverbojn, aforismojn, frazojn ks kun helpo de la RIMARO.

Gravas nur komenci, kaj la afero de verkado kaptos vin, ĉar estas alloga kaj distra!  
Skribu al ni !

## SAĜA ESPRIMO

**Margarita Zujeva [MOSKVO, Ruslando]**

*Helpe de RIMARO por ŝerco verkato*



Estas bone: *en vizaĝo - saĝo, sed ne angozo.*

Estas malbone: *ĉe vilaĝa plaĝo sen amozo.*

*Sentenco*

### Aĝo

Vigla saĝo - energia vizaĝo

Vigla saĝo - vasta omaĝo

Senkosta garaĝo - nur bela miraĝo

### Abo

Knabo ludas ĉe stabo

Sur kabo floras faboj

Knabo sidas sur trabo

### Ado

Ĉe serenado bonas  
manĝi ĉokoladon kaj marmeladon, trinki limonadon.

Ni portu por mikado multe da ĉokolado



**Bill Thorne**  
**RIMARO**

ALO  
admiralo  
alo  
analo  
animalo  
balo  
batalo  
centralo  
ĉevalo  
decimalo  
detalo  
eskalo  
eventualo  
finalo  
generalo  
halo  
idealo  
ĵurnalo  
kanalo  
kialo  
kristalo  
kvartalo  
malo  
medalo  
metalo  
mitralo  
moralo  
opalo  
pedalo  
pokalo  
rivalo  
salo  
skandalo  
ŝalo  
ŝtalo  
tonalo  
valo  
vandalo  
vualo

*Aforismo estas frato de anekdoto, amiko de paradokso kaj filo de saĝeco*  
{N.Neksin}

# A FORISMOJ

**Amice Szrajzman**  
[LONDONO, Britio]



**Katja Nosova**

[USOLJE-Sibirskoje, Ruslando]

Ĉu efektive la vero konsistas en tio, ke oni ĉiam mensogas nin?

\*

Ju pli pigra estas homo, des pli lia laboro similas al heroaĵo.

\*

Viro laboras kiom li povas, sed virino — kiom estas necese.

\*\*\*

**Igorj Belousov**

[MARKS, Ruslando]

*el taĝikaj saĝoj*

Multe da vortoj — senbezona ŝarĝo por azenoj.

\*

Se azeno ne venas al ĉaro, ĉaro venu al azeno.

\*

Kuŝi kaj sidi - aferon ne bridi.

\*

Ne diru tion, kion vi mem ne volas aŭskulti.

\*

Kiu semis urtikon, ne rikoltos tritikon.

\*\*\*

**Anton Loŝmanov**

[KOMSOMOLSK-sur-AMURO, Ruslando]

La amo estas tia stato, kiam vi vivas per la vivo de tiu, kiun vi amas.

{L.N.Tolstoj}

\*

Saĝeco estas filino de sperteco.

{Leonardo da Vinĉi}

\*

Saĝa homo amas kiel sensaĝa, sed ne kiel malsaĝa.

{F. Laroŝfuko}

\*

Kiu povas - tiu faras. Kiu ne povas - tiu instruas.

{Ĥ. L. Memken}

\*

Kiu ne povas instrui - tiu direktas.

{Akcesoro de Martin}

\*

Kiu mem opinias sin malfeliĉa, tiu estos malfeliĉa.

{Gelvecij}

\*

Ĉiu perdita minuto estas egala al perdita afero.

{Ĉesterfild}

\*\*\*

**Lidija Gonĉarova**

[KOLOS, Ruslando]

Oni devas danki la ronkantan spektanton - li ne permesas dormi al la aliaj!

**Elena Jaroŝenko**

[VOLGODONSK, Ruslando]

Bona humoro helpas en laboro

\*

Stulta ordono kvazaŭ sako sen mono

\*\*\*

**Bill Thorne**

[LONDONO, Britio]

Naturo pripensis ĉion nepran:

*kiel niaj okulvitroj retenigus sen oreloj?*

*kiel ni ne povus fumi sen pulmoj?*

*kiel ni portus novajn ŝuojn sen piedoj?*



### El vivo de kuracistoj kaj pacientoj



kolektis kaj tradukis  
**Margarita Zujeva,**  
[MOSKVO, Ruslando]

— Unu kuracisto diris, ke mi havas apendiciton, sed la alia konfirmis, ke - ŝtonojn en renoj.  
— Kaj per kio finiĝis?  
— Oni eltranĉis la tonsilojn.

\*\*\*

— Kiel vi fartas? - demandas kuracisto nejunan pacienton. Ĉu la aŭda aparato helpas?

— Jes, bonege! Mi jam 5 foje ŝanĝis testamenton!

\*\*\*

— Sinjoro kuracisto, kion vi rekomendos al mi fari por malgrasiĝi?

— Turnu la kapon malrapide dekstren, poste de dekstre maldekstren.

— Kiel ofte?

— Ĉiufoje, kiam al vi oni demandas: "Ĉu vi volas manĝi?"

\*\*\*

— Kara, kuracisto konsilis al mi veturi ripozi al maro. Kien ni veturos: al Bagamo aŭ al Cipro?

— Al alia kuracisto...

\*\*\*

— Nu, kiel vi fartas?

— Multe pli bone, sinjoro kuracisto. Mi konstante sekvis instrukcion, skribitan sur la medikamenta flakono.

— Kio ja estas skribita sur ĝi?

— Konservu kuracilon bone fermita!

\*\*\*

— Sinjoro kuracisto, kiel fartas mia edzo?

— Kuracado bonege efikas. Hieraŭ li nomis sin Ludoviko la 15-a, sed hodiaŭ nur Ludoviko la 14-a!

### Anton Loŝmanov

[KOMSOMOLSK-sur-AMURO]

— Karlo, kara, diru al mi, kiom estos duoble naŭ?

— Dek du.

— Ne.

— Dek tri.

— Ne.

— Dek kvar.

— Ne.

— Dek kvin.

— Ne.

— Dek ses.

— Ne.

— Dek sep.

— Ne.

— Dek ok.

— Jes, kara!.. Mi scias, ke iam vi estos la granda matematikisto!

\*\*\*

La bona studento.

Profesoro:

— Ĉu vi povus rakonti al mi pri la grandaj sciencistoj de la dek sepa epoko?

Studento:

— Jes, ili ĉiuj mortis.

### Katja Nosova

[USOLJE-SIBIRSKOJE, Ruslando]

— Sinjoro kuracisto, mi ĉiam ĉion forgesas.

— Kion konkrete?

— Al kiu kaj kiom mi ŝuldas!

\*\*\*

— Diru, karulo, kial vi la tutan tagon sidas sur la barelo kun benzino?

— Mi volas ĉesi fumi...

### Anna Kornjuĥina

[SUZUN, Ruslando]


Je la tria horo nokte abrupte sonoras telefono.

— Hola!

— Mi pardonpetas, ĉu vi jam dormas?

— Jes.

— Tiam mi telefonoos al vi morgaŭ.



# Anoncetoj Informoj Korespondu!

Ĉiu kadro kostas 10 rublojn por rusianoj aŭ 2 IRK por eksterlandanoj. Por abonantoj de "K" - senpage.

S-ro *Vladislav Jurĉenko*  
interesiĝas pri logikaj ludoj,  
enigmoj, poŝtkartoj pri  
ĉefurboj, ĉambraj floroj,  
hejmaj bestoj  
Molinovskij, 25-200  
Kievo  
Ukrainio

12-20 jaraj E-kursanoj  
serĉas leteramikojn  
tutmonde pri ĉiuj temoj  
TO "Esperanto"  
Lenina, 181,  
Rybinsk, 152907,  
Jaroslavska obl.,  
Ruslando

*Larry Lowe*  
mi deziras korespondi kun  
bela Brita fraŭlino kiu estas  
inter aĝoj de 30 kaj 40 ja.  
83222-029, P.O.Box 26020  
Beaumont,  
TX 77720-6020  
USA

**Grupeto de Esp-istoj,**  
(5 personoj) okupiĝas pri E-to.  
Volonte korespondus tutmonde.  
Skribu al: Manoel R. Nogueira  
Rua Luiz Gonzaga Capaverde  
685, Bairro Igra  
95560-000, Torres - RS  
Brazilo

s-ino *Helen Oldhage*,  
39 ja., turismo, reciprokaj  
familiaj vizitoj  
Jakob Ulfssons v. 8C,  
SE - 647 32  
Mariefred  
Svedio



Jurij Perevalov [LESNOJ, Ruslando]

s-ro *Michael R. Porter*  
pri bahaismo kaj kun  
bahaistoj.  
Depto. Matematikas,  
A.P. 140740,  
Cinvestas, D.F. 007000  
Meksiko

s-ino *Sandrino Menei*  
8-9 lernantoj de E-kurso volas  
kor. kun ĝeknaboj tutmonde  
CE- 1/CE 2, ecole  
elementaire, 315, routen  
des Serres, FR-06570  
Saint Paul de Vence  
Francio

**Montenegra Esp. Klubo**  
bezonas helpon por disvastigi  
Esperanton en nia landeto  
Ul. Niegoŝeva 6,  
YU-81000, Podgorica,  
Montenegro  
Jugoslavio

s-ro  
*Roni F. de Freitas*  
36 jaroj, fraŭlo,  
blankulo, deziras ko-  
respondi kun gejoj,  
viroj, soldatoj, (18-40  
ja) pri gejo kulturo,  
gejo edzeco, naturo,  
sporto, vegetarismo,  
naturismo, Dio (ne  
eklezioj)  
Caixa Postal 3788  
Brasilia - DF  
70084-970  
Brazilo

## Ĉina Radio Internacia

Tempo UTC	regionoj	ondoj(m)	kHz
11:00-11:30	Japanio, Koreio	41,84	7170
13:00-13:30	Sudorienta Azio	25,75	11650
20:00-20:30	Eŭropo	25,58	11730
22:30-23:00	Latin-Ameriko	30,43	9860

La 3-a de decembro de la kuranta jaro estos la 60-a datreveno de la fondiĝo de Ĉina Radio Internacia. Celebre al ĝi, nia radio okazigas konkurson pri koncernaĵ scioj, precipe pri ĝia pasinteco kaj nunco.

Vi facile donos respondojn, se vi aŭskultos koncernaĵajn raportojn, elsendotajn en nia programero "Leterkesto".

Demandoj de la konkurso:

1. Kiam fondiĝis Ĉina Radio Internacia (Radio Pekino)?
2. Kiam komenciĝis la Esperanta disaŭdiĝo de ĈRI?
3. En kiom da lingvoj ĈRI elsendas programerojn?
4. Kia estas la ret-adreso de ĈRI?
5. En kiom da landoj kaj regionoj troviĝas aŭskultantoj de ĈRI?
6. Kiuj du el niaj aŭskultantoj venis al Ĉinio kiel specialaj premiitoj?

Skribu al: China Radio International,  
#16 Shijingshan Road, Beijing, 100040, China

s-ro *Luis Padion Luna*  
korespondi tutmonde kun  
ludantoj de briĝo  
Empedrano Nr. 506,  
c/monseriate y Villebas,  
C.P. 10100  
La Habana  
Kubo

s-ro *Igorj Belousov*  
36 ja., korespondi tutmonde,  
interŝanĝi monerojn  
Kolhoznaja, 154-40  
MARKS  
Saratovska obl.,  
413093  
Ruslando

Viaj donacoj por KOMENCANTO  
estas ĉiam bonvenaj. Dankon!

